Proksime de la chefurbo Dodoma trovighas la regiono Manyoni kie homoj plantas rizon kaj kie trovighas trinkakvaj resursoj. La registaro ne permesis la konferencon, tamen ghi okazis kaj venis ekspertoj el Australio kaj Malio, kie homoj jam spertas la median poluon pere de radioaktivajhoj. Ili diris ke la profito por la lando estos malgranda kompare kun la longege dauranta poluado de la trinkakvo.
(angle kun germana subteksto) : www.plage.cc
---

2014-04 Homoj kiuj kritikas la **atomenergion en Hindio** vivas danghere, kvazau ili farus krimon: Okazis manifestacio kontrau la plano konstrui japanan atomcentralon en Jaitapur ...
(de) http://indien.antiatom.net/ins-gefangnis-gegen-indisch-japanisches-atom-abkommen/
===

2014-03 **Justa komerco - sindevigo por ontaj EP-anoj:**
A.Zwawa partoprenas en kampanjo por alvoki EU-kandidatojn subteni justan komercon.
Li ankau petas, ke kandidatoj por la EU-parlamento subskribu la Manifeston.
Do, se vi havas eblecon renkonti ge-kandidaton por la EP - bonvolu peti lin au shin subskribi la manifeston - bonvolu elprinti ghin. Bedaurinde ghi estas nur en la angla :(
Mi tre dankas kaj deziras chion bonan! Pozdrawiam, Andrzej Żwawa
Bonvolu subskrib(ig)i la Manifeston kaj sendu vian apogon al: andrzej.zwawa@fairtrade.org.pl

Vi povas legi pri la kampanjo: http://www.fairtrade-advocacy.org/vote4ft-campaign
kaj jen la teksto, subskribinda de kandidatoj por la Europa Parlamento (la baloto okazos fine de Majo 2014).
(angle) http://www.fairtrade-advocacy.org/images/1_manifesto_text.pdf
---

2014-03 **TTIP / ISDS / TAFTA/ CETA** etc
La Verdaj (kaj similaj) Partioj kaj ankau pluraj civil-sociaj organizoj agadas por malebligi la TTIP-traktaton. sur iliaj paghoj vi ankau povas spekti kelkajn videojn (serchu TTIP)
(angle) http://www.greens-efa.eu/eu-us-trade-agreement-ttip-11801.html
(internaciaj paghoj) www.attac.org > serchu TTIP
(germane) www.attac.de/kampagnen/freihandelsfalle-ttip/

Jen filmeto: organizita de LobbyControl.de okazis promeno tra Bruselo, dum kiu estis vizitata pluraj povaj organizajhoj kiuj favore lobias por TTIP:
www.lobbycontrol.de/2014/04/entdecken-sie-die-lobby-welt-rund-um-ttip/
(en kelkaj lingvoj sur vikipedio): www.de.wikipedia.org/wiki/TTIP

vidu ankau pri la traktato kun Kanado: CETA
http://de.wikipedia.org/wiki/Comprehensive_Economic_and_Trade_Agreement

2013-11 Le Monde Diplomatique detale analizas TAFTA/ TTIP
Antau 10 jaroj la Europa Parlamento rifuzis la MAI-Traktaton (multiflanka traktato pri investoj).
Nun minacas TAFTA - pli eble poste ... (temas ankau pri NSA, GMO, politika memstareco)
(lau Lori Wallach, en la germana versio de LMD Novembro 2013, kaj alia en Dec-o)
----------

2014-04-02 **Britio intencas konstruigi 2 novajn EPR-reaktorojn en Hinkley Point.**
Germanaj - certe ankau alialandaj - asocioj protestas kontrau tio,
unue pro la kontinua poluado pere de radioaktivaj eligoj, due pro la katastrofo-risko,
trie, char Britio volas subvencii la atoman kurenton kaj petas permeson de la EU.
http://www.ews-schoenau.de/einspruch.html?tx_powermail_pi1[mailID]=8625&cHash=db5473924771eeb9f451df2e7e95c12f#c8625

---
2014-04-02 germana civitana elektro-provizanto EWS-Schoenau metas informon en Esperanto sur la retejon.
Fakte temas pri la traduko faritaj de AVE-anoj de la
"100 Bonaj Argumentoj kontrau la Atomenergio", kiu trovighas jam en pluraj lingvoj sur la retejo de EWS. Jen la ligo: www.100-gute-gruende.de
Char nia traduko ankau ligas al la sur-bazaj dokumentoj, se vi alklakas la Esperanto-Flagon, vi estos pli-ligata al tiu de AVE:
-----

2014-03-31 Japanio akceptas la finon de komerca baleno-kaptado
La Internacia Jugh-Kortumo en Den Haag decidis ke plejparto de la japana beleno-kaptado ne rilatas al sciencо, sed simple al viando-vendo.
(lau germana TV-kanalo ARD: http://www.tagesschau.de/ausland/walfang142.html )
---

2014-03-31  IPCC raportas pri la klimata minaco
La unua raporto de la nuna raporto-periodo aperis. Ghi rakontas pri
- tutmonda plivarmigo > sekeco pli-oftos, insektoj k.a. vivuloj migros al la nordo;
- fandigho de glacheroj > altigas la akvonivelon, problemoj por malaltaj terenoj, shanghas la specifan densecon de la marakvo kaj tiamaniere povas shanghighi la mar-fluoj*;
- varmigo de la oceanoj > pli da humideco en la aero, pli da inundoj.
http://www.climatechange2013.org/
*) tio ankau trafos fishojn k.a., char parte mankos la oksigeno en regionoj kie la akvofluo iras alten:
http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Den+grossen+Auftriebsgebieten+der+Ozeane+geht+die+Luft+aus,6,a28140.html
----------
2014-03-18  Atomcentralo Fessenheim (Francio, Alsaco, je la Rejno-kanalo)
Okazis granda manifestacio Dimanche 2014-03-09 sur pluraj pontoj kaj poste komune antau la centralo de Fessenheim
Evidente la protekto de la centralo estas ne tre bona, char hodiau nokte okazis okupacio de la atomcentralo - feliche de Verdpaco (kaj ne de teroristoj).
La komuna trilanda ascoio TRAS metis 7 bazajn argumentojn por tuj malshalti la 2 reaktorojn.

1. maltauga loko - pro la oftaj tertremoj.
2. ghi estas tro malnova - la plej malnova de la francaj reaktoroj (ek-funkciis 1977).
3. psikologio - oni opinias, ke la reaktoro estas sekura. Kiam oni planis & konstruis la reaktoron ankorau ne okazis atomkatastrofo.  Tiu de „Three Mile Island“ en Usono okazis nur 1979, kaj tie oni havis felichon, ke la fandighanta reaktorkerno restis en la betono - kaj ne atingis akvon (kun akvo okazas eksplodoj kiel en Fukushima). La 2013 instalita plibonigo (plialtigo de la funda betona plato ne sufichus en kazo de katastrofo).
4. malforta sekureco-kulturo - tro multaj eksternaj laboristoj ne garantias sekuran majstradon, kion montras oftaj problemetoj.
5. sen-respondeca kontrol-autoritato - oni trovis plurajn aliajn mankojn okaze de la 10-jara kontrolo, sed la instanco lasas al la firmao reagi al tiuj.
6. ne-sufiche certa malvarmigo - la kanalo trovighas super la grundo-nivelo, okaze de romp(igh)o de la digo estus problemoj por la malvarmigo (rememoru Fukushima). Oni instalis grundakvo-fonton, sed tiu liveras nur 50 kub-metroj po horo - kiam la chefa malvarmigo paneas, oni bezonas dum al unuaj horoj 2000.
7. ne-porteblaj riskoj - en chirkauajho de 150 km loghas 6 milionoj da homoj, tie estas grandaj resursoj da bona trinkakvo (Lago de Konstanco, alpaj riveretoj) - evakui ech nur 1 milionon en la chirkauajho de 30 km praktike ne eblas. Fukushima kaj Chernobilo estis malpli dense loghataj. La kostoj (riparlaboroj, perdo je tereno, perdo de uzeblaj domoj kaj fabrikoj, ...) estus 3000 - 5000 miljardoj - neimagebla ekonomia risko.

Informoj de tri-nacia TRAS: www.atomschutzverband.ch
Aliaj argumentoj: Chiu atomreaktoro daure eligas radioaktivajn isotopojn pere de la kamentubo kaj en la akvon; aparte kiam oni shanghas la fuelostangojn la eligo amasighas - sed dank al monitorado kiu raportas nur averaghajn mezurovalorojn, oni ne legas pri tio. La risko malsanighi je kancero altighas aparte por infanoj kiuj vivas en la kutima ventodirekto.

- La asekuro por atomreaktoroj estas ridinde malalta - ankau la ekonomian riskon portas la homoj kaj la shtatoj.  http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/fessenheim-ausstellung.html

Kaj jen la foto kaj raporto pri la okupacio:
http://www.fr-online.de/energie/kernkraftwerk-im-elsass-aktivisten-besetzen-akw-fessenheim,1473634,26586370.html

Jen 100 (fakte 116) Bonaj Argumentoj Kontrau Atomenergio:
en 8 lingvoj: http://100-gute-gruende.de/index.xhtml
en Esperanto: http://www.verduloj.org/100_argumentoj.htm
---
2014-02 **Norda Koreio pripensas ekologion kaj etan merkato-ekonomion**
la nova diktatoro KIM Jong Un lanchas/akceptas privatan et-merkaton; kaj instalis novan ministerion pri „konservado de la lando/grundo kaj de la arbaroj“, char okazis grandaj inundoj kiuj detruis stratojn kaj minejojn, kaj la senarbarigo kauzis erozion*.
(lau P. Maurus, germana versio de Le Monde Diplomatique 2014/2, p. 8-9)
Komento mw/AVE:  Post la senarbarigo sekvas perdo de akvo-tenivo, kiu reduktas la kontinuan provizon da akvo en riveretoj.
---

2014-03 **Libro pri la sen-respondeca neokolonialisma politiko de P.R.Chinio.**
Temas pri i.a. la amasa ekspluatado de sibiriaj arbaroj, pri ekspluatado de afrikaj minejoj dank al koruptaj gvitantoj - uzante chefe chinajn laboristojn - kaj sen pozitiva rezulto por la evoluo.
Similas al la ekspluatado pere de multinaciaj konzernoj kiel Shell, sed pli grandskale.
J.P. Cardenalo, H. Araujo „Der grosse Beutezug - Chinas stille Armee erobert den Westen“, eldonejo Hanser-Verlag, München
sonnenseite.com/Buch-Tipps,Chinas+ungebremster+Weg+zur+Weltmacht,34,a27889.html
---

2014-02-27 **Soros proponas internacian Marshall-Planon por la Ukraino**
Usono, EU kaj Rusio devas kunsidi kaj krei tian fonduson. Ne taugas splitigho.
Ankau Rusio gajnos de sana Ukrainio. George Soros skribis pri tio en germana gazeto.
Li estimas la rolon de Ukrainio kiel pordo inter EU kaj Rusio.
http://www.sueddeutsche.de/politik/machtwechsel-in-kiew-helft-der-ukraine-mit-einem-marshall-plan-1.1899731
===

2014-02-11 **Pozitive: La Monarhho-papilio (Danaus plexippus) ankorau ekzistas**
La chefa regiono kie vivas tiu bela migranta papilio estas Norda Ameriko, kun tre limigita vintro-restadejo (18 ha) en la Sierra Nevada en Meksiko. Milion-ope ili flugas en autuno al tiu loko, kaj en la printempo ili revenas al Usono, kie ili kutime havas 4 generaciojn, kiuj etendighas finfine ghis la suda Kanado. Oni komencis kalkuli la papiliojn en 1993, ek de tiu tempo la kvanto reduktighis de jaro al jaro.
En centra Usono kie vivas la larvoj etendighas monokulturoj kiel GMO-majzo kaj -sojo kaj oni uzas pesticidojn. Krom tio, pro la monokulturoj malaperas la silko-planto - la chefa (sola) nutrajho de la papilio-larvoj.
Krome, ghis antau-nelonge oni forhakis parton de la speciala Oyamel-arbaro en Meksiko, kie la Monarhho tra-vintras.
Intertempe Meksiko konservas tiun-chi arbaron, sed en Usono kaj Kanado necesas protektaj areoj - alimaniere la spektakla papilio-migrado ne plu vidighos.
(lau Sandra Weiss, Bad. Ztg. 2014-02-11, p.10  - en Vikipedio, vidu sub „Monarch“)
---

2014-03 **Chehhio planas en nova energiokoncepto pliajn atomreaktorojn**
**Bonvolu protesti ghis la 18a de Marto (vidu sube).**
Tio signifas pliajn rekatorjn je la aktualaj lokoj Dukovany kaj Temelin, kaj je pliaj lokoj.
La plilongigo de la utiligo al 60 jaroj alportas plian riskon por katastrofo - kiu ne estos surloka.
La radioaktiva poluo-nubo de Chernobilo el-pluvis 2 500 km for de la katastrofo - en suda Germanio.
Troa afero estas, ke Chehhio (kaj aliaj landoj) volas la permeson de EU subvencii la atom-teknologion, char ghi ne estas ekonomie efika.

Ankau civitanoj en la najbaraj landoj rajtas protesti formale en „limsaltanta strategia medio-evaluiga proceduro“ - tio validas ghis la 18-a de Marto
La Naturmedio-Instituto en Munkeno preparis germanlingvan objheton (kontrauargumenton), kiun oni povas shanghi laubezone. Jen:
umweltinstitut.org/radioaktivitat/aktionen/kein-akw-ausbau-in-temelin-996.html#einwendung
===

2014-06-07 (Sabato) AVE kunvenos en Erfurt okaze de la Germana Esperanto Kongreso
Dum publika kunveno mi **prezentos AVE kaj la afrikajn projektojn** en Tanzanio kaj D.R. Kongo. Krome AVE partoprenos la vesperan Movadan Foiron
Pliaj informoj: http://www.esperanto.de/gea.malnova/dek2014.html ---
2014-02 **Artikolo pri Mazingira** en la jhurnalo de GEA „esperanto aktuell“ 2014/1, p. 15
---

2014-03-10 **Agotago por Autonoma Tibeto**
En pluraj lingvoj vi trovos informojn pri 16 temoj rilate Tibeton - la chinan & la tibetan vidpunkton (germane) http://www.tibet-initiative.de/
(tutmonde - trovi regionan grupon) http://tibetnetwork.org/find-a-tibet-group/
---

**2014-03-14 Internacia Ago-Tago por protekti riverojn kaj kontraui barojn:**
(lingvoj: cn, en, es, pt) http://www.internationalrivers.org/international-day-of-action-for-rivers
---

2014-02-24 **Pri la kazo Emmanuel Giboulot kiu rifuzis venenigi sian vitikulturon**
Kiel vi jam legis en la franca, la vitikulturisto Giboulot havos pun-proceson char li rifuzis shpruci venenon kontrau cikadoj/cikadeloj. Leo danke tradukis la tekston kaj jen nur la plej baza informo. La proceso okazis je Lundo la 24a de Februaro 2014
Intertempe oni kolektis jam 400 000 subskribojn - povus esti ech pli.

**La naturaj alternativoj estas efikaj!**
Fakte, kontraŭe al tio, kion asertas la aŭtoritatoj, ekzistas pluraj rimedoj por protekti la vinberujoj kontraŭ la cikadelo* dume plene respektante la medion.

- la vinberujoj povas esti protektataj per filikoj kaj rostita argilo;
- ekzistas efikaj kaptiloj por cikadeloj*, (cikadeloj* estas allogataj de oranĝa koloro);
- oni ankaŭ povas meti inter la piedoj de la vinberujoj avenan pajlon aŭ aluminian folion, kies forta lumreflekto malhelpas la insekton meti sin tie. Eksperimentoj montris, ke tiu simpla rimedo estas same efika kiel la insekticido;
- Sed precipe per protektado de la biologia diverseco oni plej efike kontraŭbatalas la cikadelojn*, ĉar tiuj estas insektoj ŝatata de multaj ĉasbestoj en la naturo. La problemo estas, ke tiuj ĉasbestoj, araneoj, mantoj kaj iuj cimoj, nuntempe estas forigataj el la nebiologiaj vitejoj, kie la faŭno estas ruinigata de la insekitcidoj. Tiuj solvoj estu ne kontraŭataj sed kuraĝigataj de la aŭtoritatoj.

Mi metis la tutan leteron kune kun bazaj informoj en Esperanto pri la koncerna malsano al nia retejo: **Verduloj.org**
La kultivistoj, kiuj uzas ilin, devus esti gratulataj kaj prezentataj kiel ekzemploj, ne terorigataj de juraj minacoj. Tial mi petas vin subskribi la subtendeklaron por Emmanuel Giboulot.
Bonvolu subskribi la subtendeklaron por Emmanuel Giboulot che
http://ipsn.eu/petition/viticulteur/index.php

Kaj jen informo pri la planto-malsano:
(en la germana, franca, angla , itala, pt): http://de.wikipedia.org/wiki/Goldgelbe_Vergilbung
---

2014-02 **Mikro-plastajhoj en kosmetikajhoj kaj en la akvo - kaj en la fishoj ...**
Oni pli kaj pli uzas mikro-plastajhojn - ekzemple por purigi la hauton.
Ankau el normalaj plastaj ajhoj foriras mikro-plastajhoj pere de kribrado pro vento kaj ondoj. Ili absorbas diversajn kemiajhojn, pesticidojn, moligenzojn ktp.. Se fisho au besto au homo manghas, la probableco altighas, ke kune kun la manghajho eniras mikro-plastajhoj. Sur nia retejo

trovighas mia prelego „Plastajhoj en la akvo“ - kun la informo, ke pluraj utilaj kemiajhoj agas kiel kseno-hormonoj, do, estas san-dangheraj.
Jen la prelego en Esperanto: http://www.verduloj.org/akvo.htm
(en la germana) http://www.bund.net/mikroplastik
Tie (tute sube) vi ankau trovas liston da purigenzoj kaj kosmetikajhoj - malgrau en la germana, vi trovos konatajn tutmondajn komercajn markojn.

*Konsilo de AVE:* evitu plastajhojn, aparte mikro-fibrajn vestajhojn, ne forjhetu plastajhojn,
===
2014-02 **Glyphosat / Roundup - mortigas ne nur plantojn**
Glyphosat estas uzata vaste en ghardenado kaj kune kun GMO-semoj.
Oni trovis ghin en 45% de la analizitaj personoj (182 en 18 europaj landoj) - inter ili 90% en Malto, sekvata de Germanio, Britio kaj Pollando, la homoj eligas ghin pere de urino, sed daure enprenas ghin per la manghajho.
Germana shtata instituto altigis la (maksimuman) tagan enpreno-kvanton de 0,3 mg/kg al 0,5 mg/kg korpopezo (po 0,5mg al 1 kg korpopezo).
La kritikantoj diras, ke ne pro la sendanghereco, sed pro la alta kvanto de aktuala enpreno.
Granda problemo estas la aplikado de G. por rapidigi la maturecon de kelkaj legomoj (sekigi ilin); tiamaniere la veneno ne plu estas metabolizata, kaj venas al niaj teleroj.
Lau sendependaj studoj Glyphosat damaghigas embrionojn, povas kauzi kanceron kaj ghenas la hormonan sistemon; evidente estas la san-problemoj de laboristoj en Argentinio, kie oni grandskale kultivas GMO-sojon.
Nur en 2015 EU denove kontrolos chu ghi estas san-sekura.
BUND estas germana CSO (Civil-Socia Organizajho) por medio-kaj naturprotekto en Germanio, kaj apartenas al la tutmonda FOE.org  (Amikoj de la Tero) - la retejo estas en la germana:
www.bund.net/aktiv_werden/aktionen/glyphosat_verbieten/kurzinfo/studien_und_fakten/
(internacia) www.foe.org
---

2014-02-18 **Tiroida kancero 40-oblighis je infanoj chirkau Fukushima**
Ghis Dezembro 2013 estis analizitaj 269mil infanoj: kaj je 47% oni trovis shanghighojn je la tiroido. Intertempe oni operaciis 33 kaj operacios pliaj 41 infanoj pro tiroda karcinomo.
Post Chernobil la nombro da tiaj malsanoj altighis dum pluraj jaroj.
(lau Manfred Kriener, taz, 2014-02-18, p. 11)
*Komento mw:*  Je miaj du fratoj - kiuj estis junuloj en 1986, kaj loghas en la regiono en suda Germanio kie falis la radioaktiva nubo ch. 5 tagoj post la atoma eksplodo - necesis foroperacii la tiroidan glandon - eble pro la radioaktiva lakto.
==

2014-02 **Tanzanio ne sufiche bone gardas siajn elefantojn, kaj aliajn natur-richajhojn**
Dum la 10 jaroj de la prezidenteco de Kikwete okazis amasa mortpafado de elefantoj en la Selous-Nacia-Parko en Tanzanio: de 75 mil resti nur 13 mil.
Krom tio temas pri redukto de la areo pro uranio-ekspluatado, pro nova haveno, kiu minacas specialajn fishojn, pro uzado de natron-enhava lago kie vivas 2,5 miljonoj nanaj fenikopteroj.
Certe ankau Tanzanio rajtas evolui, tamen ne chia agado estas pozitiva evoluo, kaj ofte la eksterlandaj investantoj elsuchas la landon.
Jen peticio - ankorua en la germana:
http://www.regenwald.org/aktion/937/rettet-die-elefanten-tansanias?mt=1767&v=1&ref=nl
kaj jen pliaj informoj
https://www.regenwald.org/aktion/937/rettet-die-elefanten-tansanias#more
---

2014-02 **Gazprom ricevis publikan premion**
Pli bone diru mal-premion. Pro la senrespondeca nafto-ekspluatado en la arkta oceano. Se okazus akcidento simile al la Meksika Golfo, la sekvoj estus pli gravaj, char en tiu malvarma akvo la kruda nafto estus metabolizata ege malrapide, kaj detruus la biosferon dum longa tempo.

Verdpaco mencias okazintajn akcidentojn: aktuala 206 likajhoj sur naftokampoj de Gazprom; en 2011 okazis akcidento sur produktanta bor-platformo Kolskaja: 53 homoj mortis. **Gazprom** plejparte apartenas al al rusa shtato, havis kosman profiton de 83 miljardoj da Usonaj dolaroj en la jaro 2012 - sed ne elspezas sufiche por altigi la sekurecon.

Mi vizitis la nafto-muzeon en Tjumen (en 2000), en la tiea nafto-instituto oni montris nafto-poluojn en la Tundro dum la sovetiaj tempoj, kiuj malebligis pashtado de la boacoj en grandaj areoj. Evidente - post la neniigo de Jukos - la sovetiaj tempoj revenis.
Ne estas konsolo, ke ankau **Shell** detruas grandajn areojn ekz-e en Nigerio pro nafto-ekspluatado, enspezas miljardojn, sed ne elspezas sufiche da mono por „pura produktado“; tiel aspektas la mapuraj avidaj manoj de la kapitalismo.
(en la angla) http://publiceye.ch/de/case/gazprom/
===

2014-02-01 **Mediodetrua Olimpiko en Sochi -** Bavaranoj malhelpis similan.
Por establi la Olimpikajn Vintroludojn Rusio detruigis la naturon per grandskala forhakada de montaj arbaroj. Sochi trovighas sur malvasta borda regiono inter Kaukazo kaj Nigra Maro, apudas Nacia Parko; sole por chiuj novaj konstruajhoj necesis grandegaj areoj, kiuj estis ekologie - kaj pejzaghe - tre valoraj. El ekologia biosfero de la rivereto Mzymta restis akvo-kanaleto - aparte pro la trajnolinio & stratego. Putin promesis „verdajn Ludojn“, sed en tiu regiono tio simple ne eblas. Civitanoj en la regiono de Sochi ne estis demanditaj - la trinkakvo de Sochi chefe venas el tiu montara rivereto. En aliaj regionoj - suda Bavario, Stokholmo, Svisio - la civitanoj havis la eblecon diskuti kaj finfine malpermesi la ludojn.
Vi certe trovas informojn ankau en via lingvo - jen tri artikoloj en la germana:
(lau G. Dornbluet, http://www.dradiowissen.de/olympia-dreckiger-schnee.33.de.html?dram:article_id=275656 ,
http://www.tagesspiegel.de/sport/die-gruen-gewaschenen-spiele-olympia-in-sotschi-die-reinste-umweltkatastrophe/9410936.html ,
Asocio kiu monitoras ekologiajn sekvojn de OL subtenis la civitanan proteston kontrau OVL en suda Bavario: http://www.geof.de )

*Komento AVE/mw:* ni ja ne kontrauas sporton. Sed la komerco nomumita Olimpiko estas ne plu eltenebla sur nia tero. Se vere necesas: eble oni konstruu konstantajn lokojn por vintro-ludoj ie en Siberio (Uralo - Workuta) kaj por la someraj ludoj ie kie oni ne tro ghenas la medion (eble taugas la salaj ebenajhoj en Irano) - chu bona ideo ?
---

2014-02-01 La golfo **Guanabara che Rio de Janeiro - plastajhoj kaj bakterioj**
Por havi pli puran akvon por la Olimpikaj someraj Ludoj 2016 oni finfine aktivas purigi la akvon kaj la bordojn de la golfo. Plastajhoj ghenas la aspekton kaj ankau la vel-krozado; trinki la akvon se oni naghas estas san-dangere pro granda bakteria poluo. Ankau fishistoj plendas pro damaghoj al iliaj retoj. Germana publika TV sendis video-blogon pri tiuj agadoj.
Fakte necesus ke la urbanoj estas pli medio-afablaj.
http://www.tagesschau.de/videoblog/tudobem/muell-in-rio100.html

2014-01 **Brazilo mankas nodoj por la fervojo - oni oferas homojn je trafik-akcidentoj**
Ni havis denove junan gaston el Brazilo: Diego, kiu varbis i.a. por partopreno je la IJK en sia regiono Fortaleza.
Li ankau forte substrekis ke mankas tauga infrastrukturo: al la fervojaj linioj es sia regiono mankas la reto (ili finas ie ajn);
pro tio ankau la pezaj transportoj estas sur la stratoj, unu el la sekvoj: multaj (junuloj) mortas je trafik-akcidento.
----

2014-01 **Ni deziras Felichan Novan Jaron - Kiel mezuri nacian felichon kaj bonstaton ?**
Jen la plej konataj naci-rilataj koeficientoj (chiuj krom la lasta en http://www.eo.vikipedia.org)
MEP - Malneta Enlanda Produkto: la kutima, sed ne adekvata, mezuras chefe pagatan laboron.
GINI-Koeficiento - mezuras la egalecon rilate la richecon
Indico de homa disvolviĝo - kunmetas BNP + Edukado + Sano kaj averagha agho
Ekologia_Premsigno - kiom da agroareo bezonas 1 homo dum 1 jaro (> ankau „Agendo_21“)
Felicheco-Indico - kunmetita el ghenerala kontento + agho + ekologia premsigno
(en diversaj lingvoj, sen Esperanto) > http://www.de.wikipedia.org/wiki/Happy_Planet_Index
---

2014-01 Perklorato en legomoj - malsolubra
Perklorato estas simpla kemiajho, uzata ekzemple kiel medikamento por tiroidaj problemoj.
Intertempe sufiche granda kvanto da perklorato estis trovita en legomoj el 15 diversaj landoj.

La tolerata dozo estas 1 mg/kg; sed la germana Federacia Instituto pri Riskoevaluado (BfR) opinias, ke oni devus malaltigi tiun sojlo-nivelon, pro riskoj je homoj kun malsanaj tiroidoj.
(lau Katharina Luebke, taz, 2013-10-18, p.8)
---

2014-01 **Financa investo en EU ighos pli sekure kaj malpli danghere**
Atingita interkonsento por pli travideblaj reguloj pri interŝanĝo de financaj produktoj.
La direktivo Mifid dua (Markets in financial instruments directive), la ĉefa financa normaro, estigos:
- limigojn al financa spekulado sur varoj kaj sur krudaj agrikulturaj produktoj;
- pli da travideblon sur la merkato de derivaĵoj kaj de krudaj materialoj;
- naciajn limigojn kontraŭ merkata manipulado kaj difektigo.

Krome la bursoperaciantoj devos akurate informi la investantoj por ilin deteni de "toksaj" produktoj.

La interkonsento devos esti taskita de Esma (European securities and markets authority) kaj poste aprobita kaj de la Parlamento kaj de Ecofin. La novaj preskriboj funkcios ekde 2016.

Financial Times ĝin difinis “la plej grava reformo de la financaj merkatoj ekde 2008". La proparolanto de la germanaj Verduloj deklaris: “Post jaroj da bataloj de la civila socio, ni atingis gravajn rezultojn. Inter ili striktajn limojn al finaca spekulado sur nutraĵaj produktoj, kaj malfaciligojn al financaj transakcioj je alta frekvenco”.

Fine Britio devis cedi; ĝis la lasta minuto ĝi klopodis bari la novan normaron pri la energiaj derivaĥoj por ne perdi sian superecon ĉe la finaca Londona merkato.
(ricevita de J-K Rinaldo, EEU)
===

2014-01-03 **Vaporo el Fukushima** #3 lau TEPCO ne rilatas al kritikala reago de la reaktora kerno. Sed venas de pluvakvo kiu varmighas sur la tegmento de la konstruajho, au eniras tra fendoj. Ni vidos.
Tamen, risko restas, kaj daure la detruitaj reaktoroj eligas radioaktivecon, plejparte en la akvon. Fishkaptado je 20 km chirkau tiu loko estas malpermesite, kaj la kaptitaj fishoj en aliaj regionoj parte montras radioaktivecon super la lim-valoro de 100 Bq/kg.
Aliflanke ankau en la pacifika bordo de Usono alvenas la radioaktiveco de Fukushima.
(de) http://netzfrauen.org/2013/12/30/dampf-aus-reaktor-3-fukushimas-radioaktivitaet-erreicht-die-us-westkueste/
Aparte interese estas, ke oni uzis MOX-fuelon en #3, tio estas miksita uranio kaj plutonio.
(en) http://rt.com/news/fukushima-steam-nuclear-reactor-064/
Ne-konfirmita informo de serioza germana CSO (=NRO) rakontas, ke pluraj usonaj mar-soldatoj, malsanighis je kanceroj pro radioaktiveco. Ili servis sur aviadil-shipo, ekz-e por helpi al homoj sur shipoj, tuj post la katastrofo, nur kelkaj kilometroj antau la reaktoroj. Ilia advokato akuzis TEPCO-n por pagi rekompencon.
(de) http://www.blogs.ausgestrahlt.de/fukushima/strahlenkrankheiten-nach-fukushima-wolke/
Tre detala raporto estas legebla en www.wikipedia.org en multaj lingvoj.

Por ni esperantistoj aparte interese estas la **kroniko de Jasuo HORI**, kiu ek de 2011-03-12 verkas informojn ne nur pri la okazajho, sed ankua pri la sorto-batoj al la homoj.
http://www.satesperanto.org/La-30an-de-auxgusto-2013.html

Komento AVE/mw: certe tiaj informoj estas troveblaj ankau en aliaj lingvoj.

2014-01-02 **Fukushima 3 revivighas - eble terure ?**
Ek de la 19-a de Decembro la damaghita reaktoro #3 eligas pli kaj pli da radioaktivaj vapor-nuboj. TEPCO ne scias detale kio okazas, char oni ne povas iri en la konstruajhon la mortiga radiado. La radioaktiva materialo en la kerno de la reaktoro kune kun la uzita fuelo en la akvo-kuvo konsistas entute el 89 tunoj da materialo .
(en) http://www.turnerradionetwork.com/news/146-mjt
(fr) http://www.wikistrike.com/article-alerte-fukushima-les-experts-pensent-que-le-reacteur-3-est-entre-en-fusion-121820515.html